



La Voĉo de Amikejo

Informilo pri *Senlime* kaj Esperanto en Eŭregiono Mozo-Rejno

Sendita al :

*Senlime*Esperanto-Asocio en Eŭregiono Mozo-Rejno
Avec le soutien de la Communauté française**En cas de non-distribution, renvoyer à**

H. Lentzen

Feldweg 20

BE-4701 KETTENIS

Tel. xx-32-(0)87-55.43.26

E-mail : lentzen@senlime.org**Editeur responsable****Responsa eldonanto +****Informoj en la franca lingvo:**

Tel. +32-(0)87/33.02.92

GSM +32-486-947.957

Mail: jacques@senlime.org

Esperantista Grupo de Verviers

J.-M. Jacques, 5 rue J. Wauters

BE-4800 VERVIERS

Informatie in het Nederlands**Informoj en la nederlanda:**

Tel. xx-31-(0)43-455.14.36

Mail: parren@senlime.org

P.H.H. Parren, Heimansstr. 16

NL-6285 AM EPEN

Informationen auf deutsch**Informoj en la germana:**

Tel. xx-49-2406-7809

Mail: hogen@senlime.org

K. Hogen, Schütz-v-Rode-Str. 43

DE-52134 HERZOGENRATH

Aperas kvarfoje en jaro kaj**rete elŝuteblas ĉe****www.senlime.org****Prezoj por BE, NL kaj DE :****Unuopa n-ro : 4 EUR****Jara abono : 12 EUR**Bonvolu pagi, prefere decembre aŭ
januare, **NUR** al la konto :**979-5327148-10**

IBAN : BE41 9795 3271 4810

BIC : ARSPBE22

(banque : Argenta)

de *Senlime*, 25 rue Pierre Fluche,
4800 VERVIERS, Belgio.La kotizo (10 € - denove deviga)
estas disigita de la abono al la
papera versio de nia informilo (12€).**ENHAVO :****p. 1 : TLR-o en Napolo ☺ !****p. 2 : Niaj programeroj lupee****p. 3 : Eŭregiona kalendaro 2011-2012 (1/2)****p. 4 : Novaĵoj pri Amikejo kaj EMRo****p. 5 : Alvoko al ĝemeliĝoj****p. 6 : Verviersa angulo (esperanto preta...)****«Virtuala Trilanda Renkontiĝo»
denove en Napolo (BE-Kelmis) !****Ruinaĵoj en Pompeo****Pro la unua PEKo de A.P.E. en Mozet-a kastelo (20-22an de majo) - ege sukcesa - la prelego de J.-M. Jacques en Select pri grupa vojaĝo al Napolo («Pompei» kaj «Herculanum») estis prokrastita al alia dato: la 16an de septembro (BE-Kelmis).**

Pliaj informoj p.2 :

Jean-Marie Jacques (jacques@senlime.org)



Niaj programeroj lupee

detaloj pri anoncitaj prelegoj, vesperoj, festoj,...

Virtuala Trilanda Renkontiĝo en Napolo

Imagu: invite de **Senlime**, iun sabaton tagmeze aviadilo surterigas kvardekon da esperantistoj en flughavenon de Napolo por speciala TLR.

Programo de la vizitoj :

Sabaton posttagmeze, Pompeo. Dimanĉon matene, Vezuvo ; posttagmeze, Herculano. Vespere, reflugo al Bruselo...

Tiun belan semajnfinojn J-M. Jacques vivigos al vi per propraj filmetoj kaj dokumentoj kreitaj okaze de grupa vojaĝo al la golfo de Napolo kaj la Almafia marbordo (pri kio vi eble aŭdos kaj vidos alian fojon...).

Krom la pieda supreniro al la supro de la timiga vulkano, vi aparte ĝuos viziton de la ruinaĵoj de Pompeo kaj precipe de Herculano, pli bone konservita ol la unua (nun preskaŭ disfalanta kiel oni scias).

La (ora) «najlo» de la spektaklo estos la virtuala rekonstruo, antaŭ viaj okuloj, de la iamaj urboj... sendifektaj kaj kolorplenaj, piede de Vezuvo (ege pli alta antaŭ ĝia terura kolerego ol nun)...

Ne hezitu kapti tiun okazon, en fotelo, sen peno kaj sen danĝero, ĝui pri nekutima spektaklo, kompanse de la malĉeesto de vera trilanda renkontiĝo atendita tiuepoke...

05-20 20h30 BE-Kelmis, Sélect: **Virtuala trilanda renkontiĝo en Pompei** - raporto de J-M. Jacques pri grupa vojaĝo. Inf. jacques@senlime.org

Irlando

Dutaga trilanda renkontiĝo ne sufiĉus por la **granda rondiro ĉirkaŭ Irlando** al kiu ni invitas vin...

Riĉa kultura heredo, belegaj pejzaĝoj, proverba vivdolĉeco, ĉiam varmega akcepto fare de la enloĝantoj: jen kio sufiĉas por klarigi la entusiasmon vekitan de Irlando. La kamparoj plenaj je keltaj ruinaĵoj, mezepokaj kasteloj kaj nobeldomoj, posedas neneadeblan majestecon.

La granda rondiro per filmetoj konkukos vin de Dublino al Dublino tra multaj vidindaĵoj kiel Monasterboice, Belfast, la Ŝoseo de la Gigantoj, Derry, Glenveagh, Westport, la famega Connemara, Galway, Burren, Killarney, la klifoj de Moher, la ringo de Kerry, la **Roko de Cashel** (foto)...



Bonan vojaĝon al ĉiuj !

21-10 20h00 BE-Kelmis, Select: **"Irlando"**, aŭdvida prelego de J.M. Jacques. Inf. jacques@senlime.org

Venu ludi per Crossword forge

Crossword forge estas komputila programo konceptita por tre facile krei krucvort-enigmojn. Ĝia interagemo permesas surekrane solvi ilin.

La programo ebligas krei kradojn por la reto.

Ĉar ĉiu lingvo havas sian propran alfabeton, la konceptintoj ne forgesis esperanton!

Ortografia korektilo estas enigita por eviti eventualajn erarojn.

Konsiloj povas esti aldonitaj por helpi la uzantojn kaze de malfacilaĵo.

Kiel sciante, la celo de tiu ludo estas plenigi blankajn kvarangulojn kun leteroj, formante vortojn aŭ frazojn, per solvado de indicoj kiuj kondukas al la respondoj.

Ombritaj kvaranguloj kutime apartigas la vortojn aŭ frazojn.

Ni invitas niajn geamikojn kaj membrojn veni por kontroli siajn konojn en nia lingvo. Amuzo garantiita.

Por pliaj precizigoj...

11-18 20h00 BE-Kelmis, **"Konstrui kaj solvi krucvort-enigmojn kaj kashitajn vortojn per programo kreita ankaŭ por esperanto"**. Prelego de D. Lousberg. Inf. lousberg@senlime.org

ESPERANTO

Eŭregiona kalendaro 2011-2012 (1/2)



Senlime publikigas, por siaj membroj, agendon pri la esperanto-aranĝoj en la Eŭregiono Mozo-Rejno. Ĝi aperas rete kaj papere.

« Trilandaj renkontiĝoj » estas organizitaj de kiu ajn esperantisto aŭ esperanto-grupo en Eŭregiono Mozo-Rejno interkonsente kun la komitato de **Senlime**. Principe ili okazu dufoje en jaro (printempe kaj aŭtune), laŭvice en ĉiu el la tri landoj (BE, DE, NL).

Tiu-ĉi agendo eventuale povas enhavi programerojn de lokaj grupoj aŭ aktivaĵojn organizitajn aŭ subtenitajn de komitatanoj. Ĝi neniel iĝu kompleta kalendaro de esperanto-aranĝoj (aliaj ekzistas).

La Kelmis-aj kunvenoj de la grupoj de **Senlime** nun regule okazas ĉiun trian vendredon de monato en kulturcentro "Select", Lutticherstr. 264.

Por kiu ajn propono pri kunlaboro, ĉiam ege bonvena kaj atendata, bonvolu kontakti, prefere rete kaj kiel eble plej frue, la responsulon pri la kalendaro: Jean-Marie **Jacques** (jacques@senlime.org).

09-16 20h00 BE-Kelmis,
Sélect: "***Virtuala trilanda renkontiĝo en Napolo***",
prelego de J.-M. **Jacques**.
Inf. jacques@senlime.org

09-23 20h00 BE-Verviers,
preĝejo de la Hunj-kvartalo :
"**Post 125 jaroj, esperanto estas preta por uzo**", prelego de J.-M. **Jacques** franclingva.
Inf. jacques@senlime.org

10-21 20h00 BE-Kelmis,
Sélect: "**Irlando**", prelego de J.-M. **Jacques**.
Inf. jacques@senlime.org

11-18 20h00 BE-Kelmis,
"**Konstrui kaj solvi krucvort-enigmaĵojn kaj kaŝitajn vortojn per programo kreita ankaŭ por esperanto**".
Prelego de D. **Lousberg**.
Inf. lousberg@senlime.org

12-11 11h30 BE-Oostende,
Zamenhof-festo (malvarma manĝo, tombolo, kantoj, kvizo,...).
Inf. Marc **Cuffez**, Grupo "**La Konko**", Elisabethlaan 295, BE-8400 Oostende, Belgio.
rete: flandrio@hotmail.be



Pliaj kunvenoj en BE-Kelmis, Select, la: **03-16, 04-20, 05-18 kaj 06-15**.

16-09 20h00 BE-Kelmis,
Sélect: "**Rencontre virtuelle**" (des espérantistes des 3 pays) **à Naples**", par J.-M. **Jacques**.
Inf. jacques@senlime.org

23-09 20h00 BE-Verviers,
église des Hougnés : "**Après 125 ans, l'espéranto est prêt à l'emploi**", conférence en français par J.-M. **Jacques**.
Inf. jacques@senlime.org

21-10 20h00 BE-Kelmis,
Sélect: "**Irlande**", conférence de J.-M. **Jacques**.
Inf. jacques@senlime.org

18-11 20h00 BE-Kelmis,
"**Construire et résoudre des mots croisés et mots cachés avec un programme conçu pour l'espéranto**".
Conférence de D. **Lousberg**.
Inf. lousberg@senlime.org

11-12 11h30 BE-Oostende,
Fête Zamenhof (repas froid, tombola, chants, quiz,...).
Inf. :
Marc **Cuffez**, Groupe "**La Konko**", Elisabethlaan 295, BE-8400 Oostende, Belgique.
mail: flandrio@hotmail.be



Réunions suivantes au Sélect, La Calamine: **16-03, 20-04, 18-05, 15-06**.

Novaĵoj pri **AMIKEJ** kaj **EMRo**.

(el la ret-informilo de la Yahoo-Grupo «*Amikejo*»)

Piedpilko

La piedpilka teamo de Kelmis vetbatale ĵus sukcesis aliri la 3an (nacian) divizion, kion dumnokte festis la plej varmaj subtenantoj. Kaj la aliaj ? Ili paroladas ! Iuj asertas ke necese urbo da pli ol 10000 enloĝantoj nacinivele piedpilkadu, sed multaj opinias ke la loka teamo ne havas la nivelon, la ritmon, de la nacia divizio : ĉio dependos de la kvalito de la transprenotaj ludistoj... kaj de la renkontotaj kontraŭaj teamoj.

Kelmis kaj sunveturiloj

Oni scias ke la urbestro de Kelmis, Mathieu Grosch, Eŭropa deputito komisiita pri transportoj, aparte prizorgas tiun problemaron. La urba konsilantaro ĵus aprobis projekton lian pri instalado de tri ŝarg-konektiloj por elektraj veturiloj (aŭtomobiloj kaj bicikloj) okaze de la kompleta rearanĝo de la strato "de la karabenistoj". Tiuj konektiloj poste estos nutritaj per sunpaneloj por konsiderinde redukti la fakturon (la baza kosto estas 10000 EUR).



Kvar Kelmisaj promenadoj

Ni ĝojas anonci al la promenuloj ke, kadre de la turisma plibonigo de la Orient-belgiaj kantonoj, la Kelmisa urbo zorgis pri nova signalaro por siaj kvar ĉefaj promenadoj (sekvu la indikilojn kaj... bonan amuziĝon!).

1. Tra bele florumitaj pejzaĝoj inter Hergenrath kaj Kelmis

Aludanta al la florumita irantaro okazanta ĉiun duan jaron, la unua promenado ekiras de la preĝejo en Hergenrath (kie estas la trajn-haltejo por Kelmis) aŭ de la kultura centro «Select» en Kelmis, kie ne mankas aŭtomobilaj parkeblecoj. Tiu pado "Corso 1" laŭireblas en ambaŭ sensoj kaj serpentumas tra belaj florumitaj pejzaĝoj inter Hergenrath kaj Kelmis. Sur pli-malpli 6 km da vojo parte laciga, la marŝanto povas admiri interalie la kastelon Eyneburg (Emmaburg), la preĝejon de Hergenrath kaj la lageto de la iama Kazino.

2. Pli familia

La "Corso 2" pli taŭgas por familioj, pro malforta deklivo kaj alireblo por manĉaretoj kaj bicikloj. Ĝi foriras de la preĝejo en Hergenrath kaj ebligas, laŭlonge de 6 km, admiri la iaman kalkan uzinon, la iaman stacidomon, la arbaron de «Brand» kaj la belan valon transliman.

3. Ĉirkaŭ la kastelo Eyneburg

La tria piedvojo, longa je 11,8 km, envolviĝas "Ĉirkaŭe de l'Altenberg". Foriro de la Parkhotel por vojado ankaŭ konceptita por manĉaretoj kaj bicikloj kaj malkovro de la kastelo Eyneburg, la preĝejeto St-Roch kaj la preĝejo "Nia Sinjorino Ĉieliranta".

4. Jonkviloj, kalaminaj penseoj kaj kasteloj

Fine, la lasta sugestaĵo pasas tra vojeto longa je 9 km kiu kondukas al la kolorplena valo de l'Hohnbachtal tra kampoj kaj vojetoj. La nemalhaveblaĵoj tie estas denove la kastelo Eyneburg kaj la kastelo Thor, sur la teritorio de Lontzen. Tiu regiono elstaras pro siaj florkampoj kiel jonkviloj kaj kalaminaj penseoj. Tiu originala plezur-ekskurso estas menciita en nova libreto "La plej belaj piediradoj tra la Orientaj Kantonoj" eldonita de la turismoficejo de la orientaj kantonoj.

Por ĉiu el tiuj promenado, libreto disponeblas en la urbodomo aŭ en la muzeo pri la (rivero) Gueule, Maxstrasse, 9-11 en Kelmis ; tel. XX-32-(0)87/657504 ; museum@kelmis.be

Miss Trilanda en Kelmis

La elekto de la "Trilandima Sinjorino", kiu kutime okazis sur la trilanda punkto dum la jara festo de la vojkamionistoj, ĉiun unuan semajnfino de junio, estis ĉi-jare organizita sabaton la 7an de majo en Montzen. La temo de la konkurso estis la karnavaloj el la tuta mondo : la kandidatinoj (belulinoj inter 18 kaj 25 jaraĝaj) siavice prezentis unu landon: Brazilo, Italio, Polinezio,... Kvankam la publiko ne devis sin maskovesti, oni divenas kia estis la etoso... Ve, la gajninto ne estas esperantistino. Eble venontjare... aŭ ni organizu nian specifan konkurson "miss esperanto" !

Alvoko al ĜEMELIĜOJ

Ĉefe dank'al Valer DOUMONT (kiun vi varme dankas kaj aplaŭdas), okazis unuafoje grava "PEKo" (printempa esperanto-kunveno) de APE (Asocio por Esperanto) en Mozet (BE-NAMUR).

Tiukadre, foje amuzaj foje distraj aktivaĵoj konklude konverĝis al debato pri "**kiel konservi aŭ krei ligojn inter ni, belgoj de malsamaj lingvoj kaj kulturoj, pere de esperanto**".

Inter la proponitaj solvoj fine (kvazaŭ timeme) aperis la ebleco plioftigi kaj plibonigi ĝemeliĝojn inter esperanto-grupoj.

Senlime ĉi-rilate estas pripensinda ekzemplo : ĝi principe kunigas trilingvajn esperantistojn el Belgio (Liège, Verviers, Welkenraedt,...), Germanio (Akena Esperantorondo), Limburgoj Nederlanda (Vaals,...) kaj Belga (Limburgse Esperanto Vereniging, Peer - <http://go.to/nolimes>).

Senlime tamen fine pli similos al kunfandiĝo de disfalantaj grupetoj ol al simpla ĝemeliĝo : la koncernitaj fondintoj intencis partopreni komunajn «trilandajn renkontiĝojn» dufoje jare (kaj siavice organizi ilin), krom komunajn kunvenojn.

Fakte nun dise pluvivas grupoj en Verviers (kunvenanta en Kelmis), Lieĝo kaj la belgaj Limburgaj grupoj (kiuj pro granda distanco malofte ĉeestas en Kelmis). Tamen la Kelmisaj kunvenoj ja estas fruktodonaj rilate al la kono kaj praktikado de esperanto kaj pro la kulturaj kaj amikaj interŝanĝoj inter la trilandanoj.

Sciu ke, ekzemple, la Verviersa urbo ĝemelas kun :

Arles,
Bradford,
La Motte Chalançon,
Mönchengladbach,
Roubaix.



Tiakadre la Verviersa grupo dum multaj jaroj interŝanĝis sonbendojn kun Bradforda grupo (ŝajne hodiaŭ disfalanta).

Dum iom post iom disiĝas Valonujo kaj Flandrujo, eble al fina malsamlandiĝo, utilis ampleksigi la rilatojn inter la malsamlingvaj esperantistoj per ĝemeliĝoj inter Valoniaj kaj Frandriaj grupoj.

Ideoj pri kiel dokumenti la novajn rilatojn (interese kaj amuze) estu kolektitaj. Proponoj estas bonvenaj.

Oni povus prezenti la etoson de la diversaj partneraj urboj per tipaj manĝaĵoj, trinkaĵoj, per muziko kaj kantoj. Gravas ankaŭ la eldona aktiveco en la partneraj urboj. Tiurilate ni ne forgesu ke Zamenhof-tago ne estas nur amuza festado pretekste de naskiĝa datreveno sed tago de la Esperanto-Librotago, aŭ eĉ pli bone tago de la Esperanto-kulturo (ĉar tiu-ĉi nun evoluis kaj ne plu estas ĉefe presita !).

Simile okazu interŝanĝoj inter ĝemelitaj kluboj pri libroj kaj diversformaj kulturaĵoj (filmoj, teatraĵoj k.t.p.) en la respektivaj lingvoj. Ne nur temas pri malnovaj aŭtoro kaj dokumentoj, sed pri freŝdataj verkoj de vivantaj verkistoj.

Kompreneble la esperantistaj ĝemeliĝoj estu ankaŭ ekzemplaj por la ne-esperantista popolo. Ni do taŭge informu ilin per la diversaj medioj (gazetoj, radioj, televido, reto,...). El tio povus sekvi la emon ankaŭ uzi esperanton kiel ponto-lingvon...

La ĝenerala sekretario de **Senlime** do alvokas ĉiujn Esperantistojn el Belgio, precipe tiujn el la koncernaj partneraj urboj, aktive partopreni per proponoj kaj ideoj.

Kadre de **PEKo** estis ankaŭ proponita ke devige la prezidanto de ĉiu grupo vizitu ĉiujn aliajn grupojn en Belgio. Bona sed tre ideal(ism)a ideo : ĉu komencos la prezidanto de APE ?

Kio ajn poste okazu, mi jam sonĝas pri ĝemeliĝo kaj vizito al Oostende (mi tiom ŝatas la maron, la havenon, la ŝipojn, ... kaj eĉ aŭdi la flandran lingvon, kiun mi ve neniam sukcesis finlerni !), al Herzberg/Harz, al – kiu scias – Napolo, k.t.p. Ja ne estas malpermesate sonĝi !

Viajn sugestojn sendu al

Jacques@senlime.org
Jean-Marie JACQUES
5 Rue Joseph WAUTERS
BE-4800 VERVIERS (Belgio)

Verviersa **A**ngulo

Verviersa **E**speranto **G**ruppo

125 ans après, l'Espéranto est prêt...

Comité de V.E.G.:

Président: J. Jacob
19 Chemin de la Rostibouhaye
4910 POLLEUR (THEUX)
Tél. 087/22.10.79

Trésorier: D. Lousberg
25 Rue Pierre Fluche
4800 VERVIERS
Tél. 087/ 087/222030

Secrétaire: J.M. Jacques
5 Rue Joseph Wauters
4800 VERVIERS
Tél. 087/33.02.92

V.E.G. dépend de l' Association pour
l'Espéranto (A.P.E.)
M. Delforge
16 Rue des Glacières
6001 MARCINELLE

Cotisations

Les espérantistes et sympathisants
sont cordialement invités à soutenir
notre programme d'action en versant
chaque année l'une des cotisations
suivantes au compte

979-5327148-10

IBAN : BE41 9795 3271 4810

BIC : ARSPBE22

(banque : Argenta)

de **Senlime**, 25 rue Pierre Fluche,
4800 VERVIERS, Belgio.

*La cotisation de **Senlime** est de
nouveau obligatoire et fixée à 10
EUR (l'abonnement éventuel à ce
bulletin en version «papier» s'élève à
12 € à payer en supplément).*

D'avance, merci à tous !

A.P.E. 2011 (EGV) 14 €

U.E.A. 2011 (MA-T) 61 €

Senlime (cotisation 2011) **10 €**

**en indiquant le nom du membre
cotisant, le bénéficiaire, l'année
«cotisation de pour ..».**

Je parle l'espéranto depuis plus
de trente-cinq ans et j'ai dans
ma région des dizaines d'amis
qui le parlent aussi (plus des
centaines qui l'ont appris et ne
s'en servent apparemment pas
beaucoup). Directeur d'école, je
recevais régulièrement des
élèves "primo-arrivants" parlant
les langues les plus diverses et
que je ne pouvais pas aider. S'ils
avaient appris l'espéranto...

L'espéranto aura, l'an prochain,
125 ans donc certains se
demandent pourquoi, en tant
d'années, nous n'avons pas
encore «réussi»... et cherchent
les causes de cet «échec» !
L'espéranto serait, selon
certains, une langue «purement»
construite : construite elle l'est
en effet, mais avec des éléments
("racines" de vocabulaire) puisés
dans le pot commun des
grandes langues de
communication, ce qui explique
sa très grande facilité
d'apprentissage – et avec une
grammaire dépouillée de toutes
les "subtilités" idiotes et
vexatoires qu'on met des années
à apprendre (si on y arrive) à
l'école primaire (ce n'est pas
pour rien que certains étrangers
parlent "petit nègre" toute leur
vie!).

De plus, l'espéranto est devenu,
en 125 ans, une langue à part
entière avec sa littérature et sa
"culture", ce qui en fait le
premier choix au cas où "on"
comprendrait enfin qu'avec
l'anglais (très difficile à
s'approprier!) on ne va quand
même pas partout!

Rappelons que c'est en 1887
que L. Zamenhof a publié son
premier livre sur l'espéranto : 16
règles de grammaire et un petit
millier de «mots» de vocabulaire.
En fait, nous préférons parler de
«racines», assemblables comme
des briques de lego pour former
de nouveaux mots. Ce ne sont
que les bases de l'espéranto,
appelé par son fondateur à
évoluer dans les mains de ses
locuteurs.

1905: premier congrès universel
d'espéranto à Boulogne-sur-Mer.
688 espérantistes - qui n'avaient
jamais eu l'occasion de
converser en espéranto que par
écrit - découvrent l'efficacité de
leur nouvelle langue.

1987: centième anniversaire de
l'espéranto. Les espérantistes
sont des millions et les
infrastructures de Boulogne sont
trop petites pour accueillir les
6000 participants attendus pour
le congrès universel.

L'évolution attendue s'est
produite. Sur le plan du
vocabulaire, par exemple, même
dans les domaines de pointe
(sciences, informatique,...)
l'espéranto comprend désormais
autant de «mots» que les autres
langues. Mais, formés
essentiellement à partir des
racines de base proposées par
Zamenhof, ils s'apprennent sans
grande difficulté.

Conférence à ce sujet au local
de l'église des Hougnés (rue de
Jehanster, VERVIERS),
le 23/09/2011 à 20h00.

J.-M. Jacques